

ESPERANTO

Internacia Revuo eldonata de Universala Esperanto-Asocio

1 9 4 6

39-a jaro N-ro 495 (3)

Majo - Junio

(Fondita 1904, ne aperis dum 1943-45)

Fondinto: H. Hodler, † 1920

Redaktoro: Hans Jakob
Palais Wilson
Genève, Svislando

ENHAVO:

UNO kaj internacia lingvo . . .	17
La helpo al la familio Z. . . .	18
Svisa E-Kongreso 1946	18
La popolmigrado kontraŭvola .	19
Kie estas kiu?	20
Serĉlisto	20
Universala Esperanto-Asocio	
Oficiala Informilo 3	21-22
Bibliografio de Esperanto . . .	22
Internacia Korespondado . . .	23
Petoj kaj proponoj	24

Jara abono	Fr. sv. 10.—
(Kun ricevo de la jarlibro & premio)	
. Anonco:	
Korespondado du linioj	1.—
. Reklamo:	
Kolonero unu centimetra . . .	1.—

Poŝtĉeko svisa: Genève I 2310
Poŝtĉeko belga: Bruxelles 184200
Poŝtĉeko franca: Lyon 221-76
Poŝtĉeko sveda: Göteborg 44381

Bokförlaget Kosmos
för Universala Esperanto Asocio

Unuigita Naciara Organizo kaj internacia lingvo

La Ligo de Nacioj mortis! Vivu UNO! Granda estis la entuziasmo reginta inter ĉiuj homoj de bona volo, kiam la profeto el okcidento prezidanto Wilson, konigis sian planon krei tutmondan ligan de nacioj. Kio sekvis, ĉiuj scias: la egoismo, pro profito momenta detruis la efektivegon de bela ideo, certigi la pacon per sistemo de reciproka garantio.

Inter la problemoj kiujn la Ligo de Nacioj diskutis ĝisfunde estis tiu de l'internacia lingvo kaj ni precizigu tuj: de Esperanto. Ampleksa raporto estis ellaborita pri tio kaj sen la opozicio de granda potenco (ni ne citas ĝin tie-ĉi pro bonformo!) la propono pri instruado de nia lingvo estus fariĝinta realaĵo almenaŭ en ŝtatoj pleje interesitaj.

La posteulo de la Ligo de Nacioj, la Organizaĵo de l'Unuigitaj Nacioj, estas organismo pli kompleta kaj post kelka tempo entenas certe ĉiujn suverenajn ŝtatojn de l'mondo. Sed UNO esence diferencas de l'estinta Ligo kiel ni tuj vidas ĉe l'afero kiu pleje interesas nin: la internacia lingvo.

UNO estas gvidata de la grandpotencoj, brita, sovjeta kaj usona. Ĉi-tiuj tri reprezentas la plimulton de l'potencialo, ekonomia kaj milita. La tiom necesa influo franca sentigos nur en problemoj dua aŭ triagradaj, la ceteraj latinidaj ŝtatoj same. Absolute kaj por longa tempo forestas la germana elemento, kio de interlingva vidpunkto estas malavantaĝo, tiom stranga tio ŝajnas unuavide.

Por tuj diri: estras nete kaj klare la angla lingvo, la praktiko de Genevo, la dulingveco angla-franca estos nur okaza. Kaj ni aldonu, ke tiu ĉi unulingveco funkcias kontentige, en tiu-ĉi medio ne sentiĝas bezono de simpla interlingvo.

Kio nin interesas estas kiel ni agu por enkonduki nian lingvon en la lernejon. Kaj estas laŭ nia opinio nur unu vojo: tiu de l'Interŝtata Esperanto-Akordo en la kadro de l'UNO. La taktikon sekvatan oni jam fiksighis, necesas nur, ke la kompetentaj organoj de nia movado sciuj apliki ĝin.

Restas la demando ĉu peticio, apogita de X mil subskriboj, sendota al UNO povus havi la deziratan efikon. En jaro 1931 okazis la „Konferenco pri senarmigo“ (titolo kiun elektis la pacamantoj) kaj „Konferenco pri limigo de l'armigado“ (kiel ĝin nomis realisme la agantoj). Grandega estis la atendo je tiu-ĉi konferenco kaj la porpacaj organizaĵoj kolektis kelkmilionojn da subskriboj ekspoziciitaj en Genevo. Ĉio tio entreprenita kun entuziasmo kaj fervoro, neniel influis la iron de l'afero. Laŭ tiu-ĉi sperto kaj similaj oni povas diri jam nun kun maksimuma certeco, ke la sola rezultato de tia kolektado de subskriboj kaj sendo al UNO estos kompleza konfirmo de l'ricevo kaj nenio alia. La vojo por atingi la celon estas alia kaj post la spertoj faritaj kun la Ligo de Nacioj ni sciuj valorigi ilin!

Kaj tia klopodado nur povas esti entreprenata per instanco kiun starigas la tuta esperantistaro, inkluzive SAT kaj la laboristaj organizaĵoj.

La helpo al la familio Zamenhof.

Dekkvara raporto: S-ino Zamenhof petegas helpon.

Inter pasinta kaj nuna raporto, ni okupiĝis studi la eblecojn, laŭ kiuj Sinjorino Zamenhof, ŝia filo kaj ŝia fratino povu eniri eniri alian landon. La situacio en la hejmlando estas mizerega.

Mallonge: Ni ekrilatis kun la svisaj aŭtoritatoj kompetentaj demandante pri la kondiĉoj de restado kaj de laborebleco. Restado kun limigita daŭro kaj kun pruvo esti akceptota en alia lando, sen rajtigo labori por ekzisti.

Ni do devas serĉi alian eblecon kaj ĝi povas esti nur: elmigri Usonon. Por venki la komplikojn ni devas agi laŭ plano. Ni nin turnas hodiaŭ al la esperantista publiko, al la decidantaj povoj de la movado tiom nacia kiom internacia kun la insista alvoko:

**Partoprenu tiun ĉi helpagadon por savi
la lastajn membrojn de la familio de
nia majstro.**

Ne estas ŝerco, estas kruda, nuda vero. Kiu legas gazetojn komprenas kaj ne bezonas nian komenton. Ni scias el multaj informoj personaj, de revenintoj el orienta Eŭropo, ke mizero tie transpasas ĉion ĝis nun viditan. Apud tio regas genta malamo, spite spertoj faritaj en la pasinto. Nia penso reiras al la vortoj de D-ro Zamenhof en la poeziaĵo „Preĝo sub la verda standardo”,

*Homaron vi kreis perfekte kaj bele
Sed ĝi sin dividis batale,
Popolo popolon atakas kruele
Frat', fraton atakas ŝakale.*

Kiam en 1939 ni starigis la helpon al la Familio Zamenhof kaj dissendis nian unuan alvokon, ni pensis unue savi la Zamenhofanojn de la minacanta malsato. Neniu iam eĉ songis, kiajn teruraĵojn devis trairi la loĝantoj de l'okupitaj landoj kaj neniu pensis kiom longe daŭros la kalvario.

Ses jarojn poste, ni devas klopodati por ke la lastaj el la Zamenhofa Familio estu savotaj.

Sinjorino Zamenhof skribis al ni sub dato 25-II-46 kaj precizigis la situacion. Temas kiel jam dirite pri tri personoj nome:

Ludwik Krysztof Zamenhof-Zaleski, naskita 23. I. 1925
(filo de Adama kaj Wanda Z, nepo de D-ro L. L. Zamenhof)

S-ino Wanda Zamenhof-Zaleska, nask. 19. VII. 1899
en Varsovio — Patro Maksymilian Frenkiel, patrino
Zofia Frenkiel, nask. Zelnikiew.

S-ino Janina Minc-Zdaniecka (fratino de Wanda Z.)
nask. 12. XII. 1900 en Varsovio.

Ni proponas nun al la esperantista publiko planon de rapida helpo. Tiu ĉi helpo estu dividota inter la ekzistantaj organizaĵoj. La ĉefa kaj unua tasko apartenas al la usonaj samideanoj por havigi al la tri personoj, la necesan inviton (speciala dokumento registara por fremduloj enmigrintaj) deklarante certigi la gastigadon por difinita tempo.

(Ni ricevis ĵus informon, ke la speciala dokumento (Affidavit) estis ricevita de Sinjorino Zamenhof. Ĝi rajtigas peti la enirvizon, afero de monatoj.)

Al la eŭropaj samideanoj apartenas la tasko kolekti monsumon por ekipi la tri personojn, por pagi la vojaĝon al Usono kaj por ke ili disponu certan sumon dum la unuaj monatoj en Usono.

Laŭ prudenta kalkulo sumo de 4500 USA dolaroj devus sufiĉi. (ĉ. 20 000 fr. sv.) Kiel trovi tiun ĉi sumon, estas tasko de la Esperantistaj organizaĵoj kiujn ni informas per aerpoŝto pri la helpo entreprenota.

Siatempo en 1939 ni starigis komisionon kiu entreprenis la unuan helpon al la F.Z. El ĉi tiuj samideanoj, tri jam ne estas plu sur tero: Jean Borel, Renaud Richez kaj Ed. Stettler. Provizore ĝis elekto de pli vasta komisiono la subskribintoj daŭrigas la klopodadon.

10 an de Junio 1946.

Hans Jakob — H. Kürsteiner — Edmond Privat — Profesoro Bovet

Jarkunveno de la Svisa Esperanto Societo, St. Gallen 26 Majo — 2 Junio 1946

Post 14 jara interspaco, ree la Svisa Esperanto Societo invitis al la jara kunveno (kongreso) al la ĉefa urbo de orienta Svislando, la idilia Sankt Gallen.

La jarkunvenon antaŭiris esperantista ferio (libertempo) dum kiu prelegis Sinjoro Andreo Cseh, pri „Universala Ligo”, Kiel propagandi”, kaj „La vivo kaj la E-movado en Nederlando dum lasta militado”. Samtempe ekzistis perfektiga kurso de li gvidita. Nomo kiel temoj nature altiris la ĉeestantojn kiuj retrovis Andreon Cseh, same viglan, vivan kaj vervan kiel en pasinto, spite la travivaĵoj en okupita Nederlando.

La ekzamenojn partoprenis sep kandidatoj kvar por la supera diplomo kaj tri por la atesto pri lernado. Ĉiuj kandidatoj sukcesis. Dum la interkonatiga vespero, D-ro Edm. Privat parolis pri „La horo de Hindujo, Andreo Cseh pri „La rezistado dum la okupacio”. Muzik- kaj kantprezentaĵoj ornamis la vesperon.

La jara kunveno de la SES traktis la kutimajn negocojn, jarraporton, k. t. p., fikson de la venonta kongresloko kaj elekton de la komitato. La jara raporto estis akceptita kun danko al la komitato, Luzern estis akceptita kiel loko de la jara kunveno 1947 kaj la komitato estis konfirmita en sia tasko. Oni detale diskutis la okazigon de l'universala kongreso en 1947 aŭdinte diversajn opiniojn kaj prijuĝojn. La bela vetero favoris tiun ĉi bone sukcesintan kunvenon kaj la partoprenintoj kore dankis al la bonvolaj organizintoj, samideanoj Kürsteiner, Kehl, F-inoj Alice Früh, Lina Klee.

(Alobrogo).

Legionnaire Herbert Kunert, Dépôt de la Légion Etrangère (Bureau des détails) Bas-Fort Saint-Nicolas, Marseille, Francujo, serĉas nuntempan restadlokon de parencoj forpelitaj el Niederschlesien, Malsupra Silezio. Temas pri Eduard kaj Martha Kunert, nask. Bruchmann, el Hirschberg im Riesengebirge. 22a Aeussere Burgstrasse; pri Paul kaj Gertrud Weiss, nask. Ulrich, Zillerthal-Erdmannsdorf, im Riesengebirge, 13 Tirolerstrasse; pri Sinjorino Iringard Kunert, nask. Weiss, Zillerthal-Erdmannsdorf i/Riesengebirge, 5 Donatstr.

Georges Agricola:

La popolmigrado kontraŭvola

Karakterizaĵo de l' pasinta militado estis la kirlado de milionoj da homoj kaj ilia dislokigado. Nek la popolmigrado, nek unu el la grandaj konkerantoj de l' pasinto movigis tiom da homoj, kiom tion faris Adolf Hitler kaj lia „Miljara Regno” de malglora memoro.

La amplekson de tiu-ĉi movigado ilustras la giganta cifero de 50 milionoj da homoj, devigitaj forlasi la hejmon kaj la hejmlandon, elradikitaj de l'grundo kiu ilin vivigis.

La komencon de l'Miljara Regno signis la metoda pereigo de l'judoj, kaj la kondamnon al la „civila morto” de l' kontraŭuloj efektivaj aŭ imagitaj de l' reĝimo. Oni ne sufiĉe klare komprenis en ne-germanaj landoj, kion signifis la „civila morto”, komparebla nur al la mezepoka anatemo aŭ ekskomunikado. Perdinte rajton kaj eblecon sin vivteni la homoj migris de unu lando al alia, vivanta riproĉo kontraŭ tiuj, kiuj ne kontraŭis la komencon.

Malpli atentita pro la ombro de l'milito alproksimiganta, estis la intencita forigo de la loĝantoj germanparolantaj el Suda Tirol. La naci-socialismo paktinta kun la faŝismo akceptis tion, kion neniu registaro aŭstria aŭ germana antaŭ 1939 estus kuraĝinta proponi: forpeli aŭtoĉitonajn loĝantojn de sia tero. La kompakta rezisto de l' tirolanoj malebligis parte tiun-ĉi intencon.

La duan ondegon de forkurantaj homamasoj antaŭ la detruo kaŭzis la milito. La invado de Polujo puŝis centmilojn da homoj, precipe la judojn al najbaraj landoj. La militiro en Polujo finigita, ekkomenciĝis la sistema forpelo de l'pola kamparano, la germanecigo de l'tero. Kaj la malplenan landon devis okupi germanojn el Tirol, el la Baltaj ŝtatoj, el Germanujo. Ja eĉ nederlandanojn oni intencis transplant. Nemezurebla estas la amplekso de l'suferado, kaj de l'senespereco, de la trafitoj.

La proklamo de l'supereco de la germana raso, la postulo je vivspaco por 250 milionoj da germanoj, en estonteco proksima, sekvigis la reakcion de l' slavo, deklarita de l' germana Führer kiel parazititoj de l'homa raso. Kaj tiu-ĉi reakcio esprimiĝas en la senkondiĉa forpelo de l'germanoj el regionoj okupitaj de ili jam de jarcentoj. De tiu-ĉi kruda ordono forlasi hejmon estas frapataj 15 milionoj da homoj en Ĉeĥoslovakio, Polujo, la prusaj provincoj Pomeranio, Orienta Prusio, preskaŭ tuta Silezio, la germanoj en Hungarlando, Jugoslavio kaj Rumanio! Estis decidite de la grandaj TRI en Potsdam, ke tiu-ĉi „sengermanecigo” fariĝu humane kaj orde dum kelkaj jaroj. La realeco estas ĝuste kontraŭa. Je miloj sin trenas la forpelitoj, portantaj la kelkajn objektojn kiujn ili rajtas kunpreni, serĉantaj rifuĝejon. Terura ekzemplo de l'leĝo kruela „okulo kontraŭ okulo”. Sed ne nur la germanoj devas elporti tiun ĉi drakonan decidon. Hungaroj loĝantaj en Slovakio devos reveni al Hungarlando, kiu estas ankoraŭ pli forte punita de l' venkintoj, ol Germanujo.

Tiu-ĉi migrado ne konas ion similan en la historio de l'homaro laŭ amplekso. La senkompataj asiroj, okjarcentojn antaŭ Kristo forpelintaj tutajn popolojn; la libervola elmigro de l'hebrea el Egipto al Kananeo ne povas esti ekzemploj. Eĉ la popolmigrado en la kvara jarcento de nia tempkalkulo ne povas esti komparata, ĉar ĉi-tiuj hordoj kaj triboj sin puŝantaj en la vastan Roman Imperion ne nombris plimulte ol unu miliono dum tempospaco de unu jarcento. La forpelo de l'judoj el Hispanujo kaj Portugal, (ankaŭ tia makulo en la libro de l' historio), estis laŭ kampare, nur detaleta sensignifa. Ankaŭ la modernaj interŝanĝoj de popoloj, turkoj-grekoj, bulgarioj-turkoj sub la kontrolo de l'estinta Ligo de

Nacioj estis epizodoj, spite krueleco konfesita kaj ne povis impresi multe.

1938 la mondo akceptis rezignacie verdikton, en München, kiam la ĉefoj de l'registaroj brita kaj franca cedis por momenta paco al la diktato de l'megalomano, reginta la popolon de l'pensuloj kaj poetoj. Tio estis la signalo por forpeli kelkcent milojn da ĉefoj (kaj germanlingvaj Anti-Nazi-uloj) el la regionoj nomitaj Sudetoj. Ili devis foriri sen la havaĵoj, kaj la malplenajn lokojn okupis germanoj el la Reich. Ĉi-tiu cedo al premo similis al malfermo de akvo-kluzo; senhalte la ekslokigo, forlokigo kaj translokigo de milionoj da homoj neniel povantaj kontraŭstari tion, sin sekvis. Komence de 1939, la marĉandaĵo inter Hitler kaj Mussolini metis 200 000 Sudtirolanojn antaŭ l'alternativo aŭ elmigri Germanujon aŭ esti deportataj en la sudon de Italio.

Tuj post militfino en Polujo en 1939 okazis la neniel pravigebla forpelo de l' pola loĝantaro el la koridoro kaj el pola Supra Silezio. Kaj dum vintro 1939—1940 la perforta alvenigo de ĉiuj germanaj malplimultoj el la Baltaj ŝtatoj, Volinio kaj Besarabio por esti koloniistoj en la homsenigitaj landoj aluditaj. Pli poste la deportado de france parolantaj lorenanoj (Loreno = Lotaringio) al Suda Francujo. Kaj fine la fondo de „l' Nederlanda Orient-Kompanio”, kiu celis transplant tri milionojn da nederlandanoj al Ruslando. Ĉio tio estis nur preludo de la inkubsongaj planoj de Alfred Rosenberg, kies kaozan agadon kiel ministro por la orientaj teritorioj plenumis la „Gauleiter” Koch kaj Kube. Ĉesigis tion la avanco de l' sovjeta armeo.

„Ja estas ĉiam la malben' de l'ag' malinda, ke ĝi generigante, naskigos ree la malbonon!”

Tiel oni devas kompreni la decidon en Potsdam 1944 de la grandaj TRI, detruintaj la TRIAN REGNON, akcepti la starigon de etnografiaj landlimoj en la oriento. Sub sola sindevido, ke la amasa ekspulso okazis „orde kaj humanece”! Tiu-ĉi decido rapide prenita kondukis al okazaĵoj kiujn Vaŝingtono kaj Londono rigardas kun kreskanta konsterniĝo. Polujo ne atendis ĝis kiam oni interkonsentis en la detalaĵoj pri la sorto de Germanujo; ĝi forpelis kaj forpelas senfinajn kolonojn da loĝantoj el ĉi-tiuj, nun polaj teritorioj kontraŭ okcidento, kreskigante komplikajn tiel, ke eĉ Danlando maltrankviliĝas pro la 300 000 rifuĝintoj germanaj en suda Slesvigo. Dufoje la anglo-saksa interveno haltigis similan procedon en Ĉeĥoslovakio, tiel ke la forpelo moderiĝis. La programo de l' sengermanigo antaŭvidas forpelon de 2,5 milionoj da homoj, atendantaj nun ilian sorton en koncentrejoj.

La plej terura en tiu ĉi kolosa migrado estas la absoluta foresto de ĉia metodo kaj plano, limitante la suferojn de l' sortbatitoj je minimumo. Tiu ĉi procedo, inaŭgurita de la Tria Regno, sekvita de ĝiaj venkintoj, neniam konita en la historio, detruas perceptojn pri ligiteco de loĝanto al tero kaj traktas grundon kaj ĝian prilaboranton kiel intersangeblaj objektoj. Se nun la venkintoj opinias nepre necese, ke por senigi de la germana danĝero, ili devos procedi al tia giganta forŝovo de nedezirinduloj, ili konsciigu pri la same giganta respondeco transprenita. Ili devos kompensi tiun-ĉi procedon per plano ekonomia — koloniiga — labora por eviti la kompletan anarkion en Germanujo. Ĉu ekzistas la kompreno kaj volo, organizi Eŭropon, aŭ ĉu oni lasos ĉion al la blinda hazardo, kaŭzonte per la malespero kaj celmanko de prolektiigitaj amasoj la ekiron de sociaj perturboj, estas la sortopeza demando. Se nenio estos farata oni senintence plenumos la testamenton de Hitler: Puŝi Eŭropon en plenan anarkion.

Kie estas kiu?

Servo de reserĉado, nova servo de UEA.

Por informi la esp. publikon pri samideanoj dislokitaj, forpeltitaj, elmigrintaj k. t. p. ni kreis tiun-ĉi servon. Ĝi jam utilis retrovi personojn kaj ni invitas ĉiujn kompletigi tiun-ĉi liston per taŭgaj informoj.

Tria listo

S-ro Ansis Atkalns, (latva Esperantisto de Riga) nun D.P. Camp 570, Wedel, Holst., 1217 D.P. Assembly Centre 800 Control Unit, B.A.O.R., Via Great Britain.

Deziras korespondi kun anoj de demokratiaj landoj. Starigis kurson en la kampo de D.P. t. e. dislokitaj personoj.

S-ro Paul Cyrass-Morosovjch, Prisonnier de guerre no. 319 260 Dépôt de prisonniers de guerre no. 151, Sainte-Marthe, (Marseille) B.d.Rh. (France).

S-ro Josef Friedrich, estinta Delegito en Košice, nuna adreso Brno, Na klincich, 8. (Ĉeĥoslovakio) atendas informojn pri S-ro Seppik el Estonio.

S-ro Vladimir Golosov, fotografisto dum la Varsovia kongreso: Nuna adreso Marktplatz, Sparkasse, en Tirschenreuth, Germanujo (Ing. Mašlykin).

Sinjoro Jozefo D. Haim, Bucuresti. Nomigas nun Jozefo D. Petrin kaj logas en B-dul Domnitei 14, Bucuresti, Rumanio.

Prisonnier de guerre Otto Hast, no. matr. 1108177, Dépôt 401 Ilôt 6, Mulsanne (France, Sarthe). Estinta membro de la E-grupo de Frankfurt am Main.

D-ro Manfred Hoche, (el Ĉeĥoslovakio): PoW ME 224074, Camp (Lager) 383 c/o Chief P. o. W. Postal Centre, Middle East, Britujo.

Profesoro D-ro Hugo Jokl, estinta membro de la ŝtata ekzamena komisiono por Esperanto en Vieno, honora prezidinto de la Bohema E klubo, revenis el koncentracia tendaro. Nuna adreso Tábor 1813, Ĉeĥoslovakio.

Sinjoro Johano Kalda, DM 224 de UEA kaj estinta Delegito en Hapsal, Estonio, nun: Päljögatan 55, Helsingborg, Svedlando.

Sinjoro Kilu (Luk Ki Ngok, estinta komitatano de la Hongkonga Esperanto Asocio, revenis post 4 jara vagado. Nuna adreso: c/o Mr. Mak Pak Ting, Messrs. Lammert Bros. Auctioneer, Pedder Building, Hongkong.

Sinjoro Bernhard Kötzt, estro de la Esperanto-Fako de eldonejo Hirt und Sohn: Kluxstrasse 5—I, Leipzig N. 22, (Germanujo) Russ. Zone.

Prisonnier de guerre Rudolf Kostřba, Uffz. no. 1069 670 Dépôt 102 Colmar, Francujo, (Filo de nia Delegito en Jirikov (Georgswalde) CSR., Venceslao Kostřba.

Sinjoro Ivan H. Krestanov L.K., publicisto kaj fremdlingva profesoro en la gimnazio de PIRDOP, salutas siajn esp. geamikojn, anoncanta, ke, li savigis de la terura bombardado en Sofia, kie bruligis lia loĝejo, tuta meblaro kaj valorega biblioteko multlingva, precipe esperanta (li posedis preskau ĉiujn esp. librojn kaj gazetojn-pli ol 3000 binditajn volumojn kaj 713 gazetkolektojn de la tuta mendo), lia trezoro, ĝojo kaj fiero, io nere-starigebla kaj neforgesebla.

Oberzahlmeister Hermann Kull (el Stuttgart) nuna adreso: Prisonnier de guerre, no. 530 223, Dépôt 401, Mulsanne (France, Sarthe) Ilôt IV/20. Comp.

Sinjoro Luigi Minnaja, Viale Giulio Cesare 223, Roma.

Sinjoro Walter Mudrak, Beatrixgasse 19/9, Wien III 40.

S-ro Karilaos Pejís, adreso ĝis 1940: 6-a Polica distrikto, Kolokintus 3 Ateno., Greklando. Sciigojn pri li petas S-ro Gaston Véron, Ecole du Sacré Coeur, Domfront (Francujo, Orne).

Obergefreiter Paul Posern, (el Saksio) militkaptito. PöW 31 G — 1 132 434 U.S. Army, (France) — Petas ke oni informu maljunan patrinon. Li tamen forgesis doni adreson.

Gefr. Anton Riedel, P.o.W. (militkaptito) 86-G. 655 933 L., U.S.P.O.W.E. 9740, Napoli (Italio) — Ano de UEA el Jirikov apud Rumburk, ĉeĥoslovakio.

Sinjoro Fritz Rockmann, unu el la plej malnovaj anoj de UEA, komitatano, estrarano, direktinto de la teritoria oficejo en Germanujo, savigis. Lia nuna adreso estas: (19) Magdeburg, Freiligrathstrasse 2.

S-ro Bernhard Selzer (esperantisto el Vieno): 132 Penn Street, Brooklyn 11, N.Y. Usono.

Soldat Joachim Stichel, PoW No. 31 G — 182 0290 H., 8276 Gen. Hospital (Prov.) PoW 5 th Labor Supervision Area, Apo. 772, US Army.

Prisoner of war Nr. ME 234 071, Paul Thomas, STFW., Lager Nr. 381/9 c/o Chief P.o.W. Postal Centre, Middle East, England (Estinta ano de UEA el Leipzig).

Sinjoro Walenty Zgud, Wola Druckacka Paliniaków Str. 12, Krakow Polujo.



Antonius Aloysius Suerink, samideano el Waenaaar, Nederlando, Louisestraat 13, petas informojn pri la mortkialo de sia filo Antonio Suerink, nask. 1922, en Diepenveen, Nederlando, mortinta 17an de Marto 1944 je la 8a horo en Konzentrationslager Buchenwald b. Weimar, no. 28 826, Block 17, elektro-muntisto. Petegas ĉiun kiu povus doni informojn kaj volonte repagos kostojn.

Serĉlisto.

En tiu ĉi rubriko ni publikigas petojn de samideanoj serĉantaj familianojn perditajn, dislokitajn aŭ rifuĝintajn. Laŭeble oni infirmu la potinton rekto.

La karikaturisto Dragutin Wranka (kies karikaturaĵoj en La PRAKTIKO multe amuzigis la esperantistojn) troviĝas nun en Kufstein (Aŭstrio) D. P. C. Camp, Team 199. Li serĉas parencojn en New York City sub la nomo Mario Puratich, iasta adreso: 510 Rosedale Ave, aŭ 27 West 181 street. Utilajn intervenojn de lokaj samideanoj dezirataj.

A. Davidoviĉ, (eks-delegito de UEA en Ĉust, Ĉeĥoslovakio, Subkarpata Rusio) nun en Bucuresti, Ruman., str. Olteni 19, serĉas du infanojn, Elza kaj Tibor, naŭ-kaj sesjara respektive. Deportitaj al Auschwitz-Oswiecim kaj nenion plu oni sciigis.

Fino Palmyre De Cock, Pieter Conckestraat 2, Aalst, Belgujo, ŝatus ricevi informojn pri Lucie De Cock, arestita de la GESTAPO la 22-3-43 kaj vidita lastfoje la 21-3-1945 en la kampo de Mauthausen, Aŭstrio. Personoj kiuj estis en tiu-ĉi kampo, bonvolu tion anonci al UEA.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

PALAIS WILSON - GENÈVE (SVISLANDO)

Oficiala Informilo 1946 (3)

Adreso de UEA. Ĝis plue validas la sama adreso, Palais Wilson, Genève, telefono 2.30.34. Personoj dezirantaj renkonti la Administranton bonvolu sin anonci antaŭe por fiksi tempon de rendevuo.

Delegitoj de UEA. — Pro la tri jara izoligo de Svislando, la kontakto kun niaj Delegitoj preskaŭ ĉesis. Ni nun sisteme restarigas la reton de la Delegitoj de UEA. La Delegitoj oficantaj ĝis 1942 estas reelektataj post formala deklaro ree funkcii.

Dua listo:

Arad (Rumanio) — D.: Jozefo Wohlberg, ĉeflibrotenisto, Str. Episcopul Grigori Comsa 25.

Barcelona (Hispan., Katalunio) — D.: Delfi Dalmau, Lauria 78. Tel. 75358. D.: (por administrado, kotizoj, perado) — Ferd. Montserrat, Iberia Esperanto Servo str. Provença 79.

Bela p. Bezdězem (Ĉeĥoslovakio) D.: Albin Pieman, Machova 500.
Bern (Svislando) — D.: H. G. Rotach, korespondisto, Parkstrasse 42, Wabern bei Bern.

Besançon (Francujo) — D.: Louis Didisheim, horloĝisto, 14, Avenue Denfert-Rochereau.

Bohdanec Lazně (Ĉeĥoslovakio) — D.: S-ino Ant. Grosmanova-Vamberova, Masarykovo nam. 3.

Bojkovice (Ĉeĥoslovakio) — D.: Jan Tichon, kniĥarstvi.

Breclav (Ĉeĥoslovakio) — D.: Ant. Vaja, faka instruisto, Na pèsine 42 B 5.

Bucuresti (Rumanujo) — D.: S-ino G. Harabagiu-Nuhamovici, Str. Atena 1, Tel. 5-35-73.

Caluire (Francujo, Rhône) — D.: F-ino Blanche Clavier, instruistino, 25, rue Jamen-Grand.

Castiglione (Italio, Livorno) — D.: Arturo Passerini, sekretario de la Ligo PRO BONO PUBLICO, Via Lorenzini 16.

Ceska Skalice 250 (Ĉeĥoslovakio) — D.: Odon Horak.

Dietramszell (German., Bayern) — D.: Benno Suttner, Haus 79, Untermühlthal.

Domfront (France, Orne) — D.: Gaston Véron, profesoro, Ecole du Sacré Coeur.

Jihlava (Ĉeĥoslovakio) — D.: Josef Kozisek, Post. urad 1.

Knittelfeld (Aŭstrio, Steiermark) — D.: D-ro Adolf Halbedl, advokato, Schmittgasse 17.

Kristinehamn (Svedlando) — D.: Knut Walter Johansson, fandisto, Solhag, Box 195 c.

Ledec nad Sazavou (Ĉeĥoslovakio) — D.: Stanislav Simek, Vilémovice 17.

Libeznice u Prahy (Ĉeĥoslovakio) — D.: Miroslav Srbek, universit. stud. Bastek 16.

Livry (France, Nièvre) — D.: France Gaume, emerita profesoro, Le Chambon.

Lobito (Okc. Afriko, Portugal, Angola) — D.: José A. Marquez, notaria oficisto, C.P. 57.

Litomyšl (Ĉeĥoslovakio) — D.: Karel Pic, St. ofic., Litomyšl 226. VD.: Frant. Svoboda, Litomyšl 204.

Malacky (Ĉeĥoslovakio, Slovenio) — D.: Konst. Mikulic, Vajanského 164.

Moravska Ostrava (Ĉeĥoslovakio) — D.: Vladimír Slany, Vitkovice, Trebizského 29.

Nevers (France, Nièvre) — D.: M. Tourneucillert, poŝtisto, 21 rue Francis Garnier.

New York (USA., New York) — D.: D-ro W. Solzbacher, verkisto, Center of Information PRO DEO, 5 Beekman Street, New York 7, N.Y. (Tel. CO — 7 — 2375).

Nové Zámky (Ĉeĥoslovakio, Slovenio) — D.: Julio Schmidt, elektroteknikisto, Stefanikova u. 72.

Novy Bydžov (Ĉeĥoslovakio) — D.: Vladimír Maly, Sarleje 98.

Pardubice (Ĉeĥoslovakio) — D.: Antonín Jandík, Husova 87.

Praha (Ĉeĥoslovakio) — D.: Vaclav Savel, Strasnice, Konojedska 1646. D.: Frantisek Buhr, Brevnov, Bělohorská 187.

Prostějov (Ĉeĥoslovakio) — D.: S-ino Marie Havrankova, Pod Koširem 31.

Rajhrad (Ĉeĥoslovakio) — D.: Julius Prochazka, Benešova 82.

Riverside (Usono, California) — D.: Ray T. Arnold, P.O. 1014,

Schoonhoven (Nederlando) — D.: E. de Kuiper, lernejestro, Albrecht Beylinggracht 38.

Sens sur Yonne (Francujo) — D.: André Georget, poŝta ĉefkontrolo, 13 rue Cassin.

Sisteron (Francujo, Basses-Alpes) — D.: Victor Vignet, redaktoro, Phare de l'Espéranto, Villa Zamenhof. VD.: P. Bernard, drogisto, rue Droite.

Sofia (Bulgario) — D.: Metodi Pančev, str. Persenk 30, Sofia 7.

Sowerby Bridge (Brit., Yorkshire) — D.: John Hoyle, 13 Finkle Street.

Thiers (France, Puy de Dôme) — D.: Marius Dessapt, instruisto pri mekaniko en la nacia profesia lernejo, 16, Rue Grenette. VD.: Benoit Gonon, komercvojaĝisto, 31, rue du Docteur Zamenhof. EG.: Thiers Esperanto, Adr.: ĉe la VD.

Thun (Svislando) — D.: F-ino Alice Eberhard, Innere Ringstrasse 12.

Trencin (Ĉeĥoslovakio, Slovenio) — D.: Jaroslav Prochazka, profesoro, Stalinovo n. 42.

Tyn nad Vltavou (ĈSR) — D.: Jan Ev. Slavěk, financa oficisto, M. Str. 233.

Varese (Italio) — D.: Corrado Cerri, redaktoro, Casale Litta.

Veseli nad Lužnicí (Ĉeĥoslovakio) — D.: Frantisek Kolar, Budějovická 324.

Vevey (Svislando) — D.: Karl Hiltbold, Chemin de Cornalles, Corseaux.

Waidhofen an der Thaya (Aŭstrio, N.O.) — D.: S-ino Paula Pirchan.

Železný Brod (Ĉeĥoslovakio) — D.: Ruda Beneš, Havlickovo nam. 142.

Zutphen (Nederlando) — D.: P. Soeters, Kuiperstraat 25 - a.

Estraro de UEA. — La Estraro de UEA, konsistanta dumtempe el kvar anoj de la Komitato en Svislando estas:

H. Kürsteiner, St. Gallen (Prezidanto de UEA)

Hans Jakob, Genève (Estrarano, Hon. Administranto)

H. G. Rotach (Bern) — Charles Rosen, La Chaux-de-Fonds.

Oficiala Informilo 1946 (3) (Daŭrigo)

Esperantista Interhelpo.

Kiel ni jam informis en pasinta eldono de nia gazeto, alvenas regule helpopetoj de samideanoj en mizero. Mankas al ni la rimedoj por kontentigi tiujn petintojn. Nia Fundo, kreita en 1938 jam de longe elĉerpigis kaj novaj donacoj ne plu venas, parte pro tio ke ni ne plu alvokis, parte pro la komplikeco sendi al ni monon. Ni klopodas ĉiam trovi elirvojn, sed la petoj estas kelkfoje tiom korusantaj, ke ni ne kuraĝas informi la petinton pri la nepovo ion fari.

Kaj alvenas nun regule korespondadoj el Germanujo de malnovaj kunlaborantoj, serĉantaj la kontakton kun la devige forlasita Esperanto-mondo. Oni petas gramatikojn, lernolibrojn, unuvorte materialon. UEA malplenigis sian provizejon sendinte dum la milito al centoj da militkaptitoj, tian materialon. Nun ankaŭ tiu ĉi fonto ne plu fluas, kaj ni danke akceptas instrumaterialon eventuale akiras je favoraj kondiĉoj germanlingvaj gramatikojn. Ofertojn oni adresu al ni.

Subtenantoj.

La sekvantaj personoj bonvolis aliĝi kiel Subtenantoj por la jaro 1946. Al ili ni kore dankas. Ni sendis al ĉiuj la kutiman premion de subtenanto laŭ nia propra elekto.

1. S-ro Ed. Ducommun, instruisto, Les Brenets, Svislando.
2. Sinjoro Léon Truffart, pharmacien, Aumale, Seine Inf.
3. Sinjoro D. Chagnoux, Yzeure sur Allier.
4. Sinjoro Edmond Pomérel, Boulogne-Billancourt, Seine.
5. Sinjorino Tissot-Martin, Basel.
6. Sinjoro H. G. Rotach, Bern.
7. Sinjoro Arnošt Vana, Zilina, Ĉeĥoslovakio.
8. Sinjoro W. Haines, Blackheath, London.
9. Sinjoro Douglas, Ayr, Britujo.
10. Sinjoro Kyffin-Taylor, Birkenhead, Britujo.

11. Sinjoro Paul Bouvier, Genève.
12. Sinjoro Paul Jousset, Vincennes, Seine.
13. Sinjoro Daniel Quarello, Buenos Aires.
14. Sinjoro D-ro W. Solzbacher, Scarsdale, New York.
15. F-ino Jeanne Dedieu, Prades, P. O., Franc.

Slosiloj de Esperanto.

Ni rememorigas, ke la slosiloj de Esperanto, kun la emblemo, estas propraĵo de UEA, kiu transdonas la eldonrajton laŭ interkonsento. Ni sciigis, ke dum la milito estis eldonitaj slosiloj sen konsento de UEA kaj eĉ sen informo posta al ĝi.

Bibliografio de Esperanto

Arnost Vana: Medzinarodny jazyk Esperanto. — Slovaka lernolibro kun vortaro Esp.-slovaka kaj Slovaka-Esp. 128 p. Prezo 30 Kč. — Edicia I. Roverov-Junakov, Zilina 1946.

Dragan N. Dimitrijevič: Ideja Esperantisma Predgovor napisao Rad. P. Klajić. Propaganda broŝuro en serba lingvo, 48 p. Eldonita de Beograda E-Societo. Presita ĉe Stamparija Globus, Petrovgrad, (Banat).

Petro Stoyan: Vindiana, notre patrie préhistorique retrouvée (32 p.) Vindiana, berceau de nos aïeux. Arras 1946. En tiu-ĉi broŝuro kun du titoloj malsamaj, la aŭtoro traktas demandon karan al li: Fiksi l'originon, sidlokon kaj signifon de popolo veneda aŭ vindiana vorto retrovebla en multaj loknomoj eŭr-aziaj.

Agostinho da Silva: La vivo de l' eskimoj. El portugala tradukis L. M. F. Dua reviziita eldono. 32 p. Prezo: 0.50 Fsv.

Kotiz-tabelo kaj pagmaniero

Estas citataj nur la landoj atingeblaj. Abono sen membreco, sama prezo kiel MA.

	Mono	MJ	MA	MS
Argentinio	Pes.	2.50	7.25	20
Aŭstralio	Ŝil.	4	10	25
Belgio	Fr.	50	100	250
Brazilio	Milr.	12	30	80
Britlando	Ŝil.	4	10	20
Bulgarujo	Leva	100	250	600
Ĉeĥoslovakio	Kĉ.	25	60	200
Ĉinujo	Dol.	3	7.50	20
Egipto	Ŝil.	4	10	25
Finnlando	Fmk.	50	100	250
Francujo	Fr. fr.	50	100	250
Hispanujo	Pes.	8	20	50
Italujo	Lir.	50	100	250
Jugoslavio	Din.	50	125	300
Nederlando	G.	2.50	5	10
Novzelando	Ŝil.	4	10	25
Palestino	Laŭ brita tarifo,			
Portugalo	Esk.	15	40	100
Svedlando	Kr.	5	10	20
Svislando	Frk.	5	10	20
Urugvajo	Pes.	2.50	5	20
Usono	Dol.	1	2.50	5

Al kiu oni pagu:

ĈD: Daniel Quarello. Casilla de Correo 47 (Suc. 13) Buenos-Aires.
Rekte al C. O. de UEA.
Peranto: C. Rogister, 21, Ave. Golenvaux, Namur. Poŝteko
Bruxelles 350 321.
Oni povas pagi al ĈD. portugala, aŭ rekte al UEA.
ĈD: A. E. Hepton, 10 Linden Ave., Cottingham, Yorkshire.
ĈD: R. K. Tričkov, ul. Knjaževska 63, Vratza, Bulg.
Peranto: Frant. Slavik, Praha, Uralské 9, poŝtekkonto 16204
Oni pagu rekte al C. O. de UEA. Genève.
Rekte al C. O. de UEA.
Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kä, poŝtekkonto 6564
D. Chagnoux, Yzeure s. A. poŝteko 99.86, Clermont-Ferrand.
Peranto: Fernando Montserrat, Provença 79, Barcelona.
Poŝteko estos malfermata post nelonge.
ĈD: R. Klajić, Svetog Save 23, Beograd.
ĈD: J. Telling, Schietbaanlaan 106-a, Rotterdam poŝtekkonto 2416.19
ĈD: L. E. Dust, 20 Chelsea Str. Mirmar, Wellington E-4.
F-ino Selma Moscicki, 25 Zefania str Jerusalem.
ĈD: Manuel de Freitas, Rua Monte da Lapa, 49-1. Porto.
Kosmos, för Universala Esperanto-Asocio, p. konto 44381, Göteborg.
(Korespondadoj al Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg.
Rekte al C. O. de UEA. Poŝteko: Genève I 2310
Al S-ro Alfredo Klein, Calle Uruguay 795, Montevideo.
ĈD: J. Dubin, 34 S., 16 th Street, Philadelphia, Pa.

Internacia Korespondado

Ciu anoncanto havas la moralan devon respondi almenaŭ unufoje al ricevita korespondado pere de tiu ĉi anonco. Mal-longigoj: PI = poŝtkartoj ilustritaj, L = letero, PM = poŝtmarkoj, k. ĉ. l. — kun ĉiuj landoj.

*

Běla pod Bezdčz (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Albin Pičman, Máchova 500: L, PI, PM k. ĉ. l.

Brno 19 (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Emil Wagner, Mostni 99, L., PI.

Brno (CSR) — S-ro A. Veverka, Merkantova 146, serĉas interrilatojn por reciproka filatelista servo por tuta mondo.

Bradford-Coventry (Anglujo) — S-ro Ernest Frank Earle, 213 Burnaby Road, L. PK, pri ĉia temo k. ĉ. l.

Brunssum (Nederlando) — S-ro C. Janknegt, Vossenstraat 7, PI., L., PM k. ĉ. l.

Chotěbor 853 (Ĉeĥoslovakio) — S-ro D-ro Stan. Kamaryt, gimnazia direktoro, pri filozofio.

České Budějovice (Ĉeĥoslovakio) — Esperantista Klubo „La Progreso“, Sumavská 250 serĉas korespondantojn en ĉiuj landoj. Klubejo hotelo Slunce, Masarykovo nam., kunveno marde je la 20a horo.

Hoorn (Nederlando) — S-ro St. W. Duursma, Schoutenstraat 71, serĉas seriozajn filatelistojn ĉ. l. por mezgranda interŝanĝado de PM uzitaj kaj ne-uzitaj, sen superflua korespondado. Novaĵoj je nominala prezo.

Jihlava (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Josef Kozišek, Pošt. úrad 1 PI, PM k. ĉ. l.

Kirchdorf an der Krems (Aŭstrio) — S-ro Ernst Max Pözl, Hausmanning, 92, deziras repreni korespondadon kun samideanoj eksterlandoj, interrompitan pro la Hitler-regado.

Knittelfeld (Aŭstrio) — S-ro D-ro A. Halbedl, advokato, pri ĉiaj temoj.

Komarno (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Gejza Leváry, Sladkovičova ul. 2141 — L., PI., kĉl.

Krasna Lipa (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Karel Hečko, ĉefeŭtenanto (nadporučík) Masarykova 9, L., PK., k. ĉ. l.

Ledeč nad Sazavou (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Stanislav Simek, Jilémovice 17, PI, PM k. ĉ. l. Kolektanto, akvaristo-gaz.

Liberec 3 (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Bohuslav Pecka, fervojoficisto, Zasobarna ČSD, Nadrazi — L., PI bildfl., PM, gazet. fotojn, librojn k. ĉ. l. Afranku filatele.

Liberec 3 (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Ladislav Blecha, fervojoficisto, Zasobarna ČSD, Nadrazi. — L., PI., bildfl., PM. gazet. fotojn, k. ĉ. l. Afranku filatele.

Libeznice u Prahy (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Miroslav Srbek, universitata studento, Baštěk 16: L, PI k. ĉ. l.

Litomyšl 204 (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Frant. Svoboda, PI. ilustr. gaz., reklam. propag. pres. pri asekurado.

Litomyšl 226 (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Karel Pič, L. pri esp. literaturo, lingvistiko kun Britujo kaj USA.

Lysa pod Makytou, okr. Puchov (Ĉeĥoslovakio, Slovenio) — S-ro Vladimir Gregor gimnaziano, k. ĉ. l. pri katolika esp. movado.

Malacky (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Konst. Mikulič, Vajanského 164 — PM, neuzitajn, novaĵn, jubil. bonfart. aerpoŝt., kompl. serioj. Afranku filatele.

Milevsko 596 (Ĉeĥoslovakio) — S-ro C. Josef Vejvoda, inĝ., L., k. ĉ. l. Serĉas fak. koresp. pri metalurgio k. fabrik. de ŝamot-, dinas-, kaj silikatŝtonoj.

Mistrin u Kyjova (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Stěpan Toman, artisto, — L., PM, kĉl.

Moravská Ostrava (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Jaroslav Bujas, instruisto, Svecova 35 - Vitkovice — L., PI., PM. k. ĉ. l. pri tekniko, politiko, lingvoj, botaniko, socialismo. C. r.

Moravská Ostrava 8 (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Josef Hečko, Syllabova 9a, Zabreh — PM k. ĉ. l., bezon. katal. Zumstein

Moravská Ostrava (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Vladimír Slany, Vitkovice, Trebizsk. 29; L, PI, PM k. ĉ. l.

Moravská Ostrava-Radvanice (Ĉeĥoslovakio). S-ro Adolf Stanura, Vinuta 731 — PI., k. ĉ. l.

Nový Bydžov (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Vladimír Malý, Sarleje 98; PI, PM, k. ĉ. l.

Nymburk 902 (Ĉeĥoslovakio) — S-ro M. Suryček, oficisto, L., Pk., k. ĉ. l.

Olomouc-Nové Sady (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Albin Neuzil, lernejestro, Husitska, 12. — dez. kor. pri novaj metodoj por elementaj lernejoj.

Olomouc 11 (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Josef Rebiček, Mane-sova 1. — dez. kor. kun komercfakaj fervojistoj.

Pardubice (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Antonín Jandík, Husova 87; pri politiko kaj religio k. ĉ. l., gazet. angl., franc.

Police nad Metují (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Josef Novák, terkulturisto, Bezděkov 52 — L., PI., k. ĉ. l.

Praha IV (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Adolf Dlabač, Belcrediho 201/103 — interŝanĝas enskribitajn leterojn filatele afrankitajn, aerpoŝte.

Praha VII (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Josef Jaroš, Habrmanova 53 — PI., k. ĉ. l.

Praha VIII (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Jaroslav Schumann, Sladovnicka 1338/6 — PI., PM. k. ĉ. l.

Praha VIII (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Ladislav Kynčl, ĝardenisto, Palmovka, kun samprofesiaj pri fakaferoj. Certe respondos.

Praha XI. (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Karel Zabranský, fakinstruisto, Konevova 62, L., PI., k. ĉ. l. pri lokoj, homoj, vivo ktp.

Praha XI. (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Vilém Vycpalek, poŝtoficisto, Biskupcova 3, L, PI., k. ĉ. l.

Praha XII. (Ĉeĥoslovakio) — Jan B. Vlach, Luzicka 21, pri religio, postmorta vivo, biblio. Informas pri nova kristanismo.

Internacia Korespondado

Praha XI. (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Josef Venc, Mladonovicova 2200, PI, L, pri liter., natur. fot. k. ĉ.l.

Praha XIII/75. (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Harry H. Khel, Pivonkova 2124, L, PM, esper. glumarkojn, gazetojn, fotojn, muzikaĵojn.

Praha 47. (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Jan B. Molnar, Wintrova 15, — dez. interŝanĝi geografiajn kartojn.

Praha 54 (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Vaclav Kraus, Jeseniova 376; PI k. ĉ.l.

Praha-Michle (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Jindrich Cerny, verkisto, V úhlu 638/I: pri kulturnovajoj. k. ĉ.l.

Prostejov (Ĉeĥoslovakio) — S-ino Marie Havrankova, direktorino de knabina lernejo, Pod Kosirem 31; L kun muzikamantoj. Serĉas siajn malnovajn amikojn en ĉ. l.

Prostejov (C. S. R.) — S-ro František Arnost, Jezdecka 35, dez. interŝanĝi librojn pri juro, filozofio, literaturo, france, angle, germane, ruse.

Puchov nad Vahom (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Zdenko Fara, c/o Rolny L., kun sport- kaj muzikamantoj k. ĉ.l.

Pyšely u Prahy (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Jaroslav Kouba, gimnaziano de la VI- klaso, PM esp. glumarkoj.

Rajhrad (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Julius Prochazka, Benešova 82; PI, L k. ĉ.l.

Riverside (Usono, California) — S-ro Ray T. Arnold, P. O. 1014, L., PI. k. ĉ.l. Promesas respondi almenaŭ unufoje.

Rückersdorf u Frydlantu (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Fr. Wirth, parafiestro, Schönwald 117 L., PI., k. ĉ.l.

Sens sur Yonne (Francujo) — S-ro André Georget, ĉefpoŝt-kontrolisto, 13 rue Cassin, L., PI.

Sofia (Bulgario) — S-ro Nicolas Madjaroff, Karle Chvedski 85, serĉas seriozajn korespondantojn ĉ. l., PM. Kontraŭ 100 de via lando sendos centon da bulgaraj.

Sucha nad Parnou 146 ((Ĉeĥoslovakio) — S-ro Frant. Galgoc, oficisto, CSD., PM., PI.

Tabor (Ĉeĥoslovakio) — D-ro Hugo Jokl, profesoro, Vancurova 1813 — PI., PM., k. ĉ.l.

Trencin (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Dr. Ludev. Schwaer, profesoro, Stefanikova 33: PM kun serioz. kolekt. en Austrio kaj en transmaraj landoj. Afranku filatele.

Trencin (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Eduard V. Tvarozek, profesoro, Obchod. akadem. L. prefere kun Oriento pri polarto, kantoj, literaturo.

Trencin (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Jaroslav Prochazka, profesoro de komerca akademio, Stalinovo nam. 42; PI kun instruist. k. profesoro en ĉ. l.

Troubelice (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Stanislav Majer, Troubelice 46 u Unicova, Koresp. k. ĉ.l. Certe resp.

Tynec nad Sazavou (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Jan Zdvihal, direktoro de lernejo, - PI. k. ĉ.l.

Tyn. n. VII (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Jan Ev. Slavek, impost-oficisto, M. St. 233, salutas ĉiujn samideanojn — korespondantojn en URSS, Afriko, Turkio, Cinujo, Madagaskaro, Svedlando kaj informas ke li rekomencas la korespondadon.

Velké Mezírci (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Josef Boucek, profesoro de gimnazio, Trebická 41: PI, L, PM, k. ĉ.l.

Westwoud (Nederlando) — Anoj de ĵus finiĝinta kurso, de diversaj aĝo kaj metio, L., PI., k. ĉ.l. — Oni skribu al S-ro J. Zwarekant, lernejestro, Westwoud, Nederlando.

Wien XV (Aŭstrio) — S-ro Leo Grosskopf, Iheringgasse 14/7, L., PI., PM laŭeble bildilanke.

Zilina (Slovakio, CSR.) — Pli ol 100 esperantistoj, plejparte gestudentoj, deziras korespondadi kun la tuta esperantista mondo, pri ĉio, ĉefe pri skoltaj aferoj, botaniko, entomologio, turismo, ktp. Sendu belan poŝtkarton al: Esperantista Rondo Amika. Ni salutas la tutan Esperantujon!

Petoj kaj proponoj

Adresaro. — Tutmonda interŝanĝa adresaro, Praha-Brevnov 514 — aperas kvaronjare.

Ĉiu ne-katoliko kiu interesas sin pri la doktrino de la katol. religio aŭ ties praktikoj, senpage povas ricevi informojn pri tio ĉe la INTERNACIA KATOLIKA INFORMEJO Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Ekspozicio. — Por starigi esp. ekspozicion volu sendi al ni materialon, afiŝojn, gazetojn, leterojn, PI., ktp. — J. Labordus, van Egmontkade 49, Zuilen, Nederlando.

Jarmiloj pasas de Haefeker, eldonaĵo de Heroldo de Esperanto, estas serĉata bonkonservita ekzemplero. Ofertojn al la redakcio de ESPERANTO (por A. B.), Palais Wilson, Genève, Svis.

Interligilo. — Poŝtistoj, telegrafistoj, telefonistoj, fervojistoj, filatelistoj, atentu! La internacia Ligo de ILEPTT baldaŭ reeldonos la organon INTERLIGILO, fakan revuon por vi kaj por progresigi Esperanton en niaj fakmedioj. Tuj skribu sur simpla.

Larousse Universel. — Duvoluma, lasta eldono, nova aŭ bonkonservita estas serĉata de A. Bavaud, 30 Charmilles, Genève, Svis.

Libro-interŝanĝo. — Portugala Eldona Rondo, Monte da Lapa 49-I, Porto, Portugalio sendos siajn popolklerigajn eldonaĵojn „La araneoj“ kaj „La vivo de la eskimoj“ 28 kaj 32 paĝa, kontraŭ samvaloraj Esp. libroj, uzitaj sed sendifektaj aŭ novaj. Respondkuponoj akceptataj. Unu libreto kostas 2 respondkuponojn, ses ekzempleroj kune 10 Resp. Kup. Ne-uzitaj puraj poŝtmarkoj estas ankaŭ akceptataj (prefere memorigaj) sed tiuokaze oni aldonu 20%.

